

& Sibilla orakolas:

< Rekante 27 el 41 batoj por strofo, entute 574 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931) kun enkonduko: (Tiuepoke mi scivolis, kion la jaro 1930 estis alportonta.). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de feroa "Brúsajøkils kvæði" sed iom longigita kaj rekantaĵo el la alitaktaj partoj de la poemo. Klarigo (*) de R. S.: '12 Supozeble G. N. K. K. sinifas: Gratulaj Notoj de l' Konstanta Kritiko.>

(#Melodio:

<:41> (

/do TiLa LaLa SooFaFa LaLa LaSo LaLa; do TiLa LaLa SooFaFa dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaLa LaLa; SoFa FaFa; SoLa La;La SoLa La a; LaLa LaSo; FaSo LaLa; LaLa LaSo FaSo La a; LaLa LaLa; dore redo; dodo dodo TiLa La a)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝi loĝas en ĉambreto de subtegment-etaĝo, ; Ŝi estas sorĉistino kaj puto de mondaĝo;

(×:; **Orakolo**, ; **Karambolo**, ; **Hum-kaj-bug'** ; **De l' centrifug'!** ; **Rajdoside** ; **Surakride** ; **Super val'**, **river' kaj mont'** ; **Nun senbride** ; **Akravide** ; **Salto, saltu al Estont'!**)

'2 Por ŝi l' Estonta Tempo ne kaŝas plu sekreton ; Kaj antaŭ ol mi diris, ŝi konis mian peton.

'3 "Vi volas scii, kion la alvenanta jaro ; Alportas interesan por l' Esperantistaro?

'4 Pri tio tuj mi donos klarigon kaj informon, ; Sed mi antaŭe falu en plej profundan dormon."

'5 Ŝi tiam prenis libron (ĉar libron ŝi posedis), ; Eklegis dek liniojn kaj lace jam oscedis,

'6 Ŝi dormis.. kaj ekdormis eĉ dika araneo ; Falinta sur la libron: la "Idoj de Morfeo"..

'7 "Mi vidas... vidas urbon... Kolonjon ĉe rivero ; Prepari la kongreson kun ĝojo kaj espero,

'8 La Rejno ŝaŭme saltas ĝis super sia bordo, ; Kaj tamen la kongreso... okazos en Oksfordo!

'9 Mi vidas nun tri virojn, – aŭ eble estas kvaro – ; Jungitajn – (sed sen Teo) – al ĉaro de l' Vortaro;

'10 Venkitaj de la SAT'o jen ili tiras, puŝas... ; Ho sankta Kabe, helpu! – Ĉi tiuj kvar akuŝas!

'11 Mi vidas nun ezokon kun grasiĝanta koro... ; Ĉu tio parabolus pri C. K. kaj pri K. R.?

'12 Jes, sane pumpas K. R. kaj pompe sanus C. K., ; Se ĝin ne juke ĝenus kelkfoje G. N. K. K.*

'13 Mi vidas... dek mil homoj samkiel al spektaklo ; Sin puŝas en lernejon avidaj pri l' miraklo,

'14 Entuziasmo kreskas, triumfa ĝojo bruas, ; Ĉi tie – tute simple – sinjoro Ĉe instruas...; **Orakolo**, ; **Karambolo**, ; **Hum-kaj-bug'** ; **De l' centrifug'!** ; **Rajdoside** ; **Surakride** ; **Super val'**, **river' kaj mont'** ; **Nun senbride** ; **Viv-avide** ; **Ni revenu al la Mond'!**)